

Se poser sans s'opposer
S'exposer sans s'imposer

ISSN 0995-6255

Stariĝi sen kontraŭstari
Elmeti sin sen altrudi sin

ESPERANTO - 95

Revue trimestrielle bilingue

Dulingva trimonata revuo



Antaŭ la Domo de la Asocioj de Osny. La animantoj de la A.M.O. Asocio : Domo de Osny) akceptas S-ron Thomas M. Eccardt, Prezidanton de la Esperanto-klubo de New-York (la dua, maldekstre.

Devant la Maison des associations d'Osny. Les animateurs de l'A.M.O. (Association Maison d'Osny) accueillent M. Thomas M. Eccardt, Président du club Espéranto de New-York (le 2ème à gauche).

Jarabonoj :

Landoj de la E.K. : 6,2 Ekuoj
Aliaj : 7 Ekuoj

Foto N

Abonnement 1 an :

Prix du numéro :

Photo X

6,2 Ecus.

12 Francs

ESPERANTO-95

8, rue de l'Eglise

F-95520 Osny

CCP / PCK La Source 35 766 17 T

Numéro 11.
3ème trimestre 1991

Numero 11.
3-a trimestro 1991

Postferiaj projektoj.

oooOooo

Tiu numero aperas tiel malfrue, ke jam ni estas postferie. Fakte, la akurateco neniam estis la ĉefa eco de tiu modesta revuo. Sed ĉi-trimestre, la diversaj kongresoj, kiujn ni partoprenis, la ferioj kaj kelkaj zorgoj pri sano iom perturbis la dekomencon laborplanon.

Sed en ĉiu malbono estas iom da bono, kaj tio ebligas al ni anonci serion da ŝanĝoj en la aspekto de la revuo, ŝanĝoj, kiuj efektiviĝos iom post iom. En tiu numero, vi rimarkos, ke la franca teksto transpasis dekstren. Fakte, unu el niaj junaj lernantinoj, aprobita en tio de la tuta loka grupo, sugestis, ke por pli gravigi la Esperantan tekston, kiu estas la originala, necesis transloki ĝin maldekstren, kiel okazas kutime en la dulingvaj verkoj. Ni konsentis pri tiu propono.

La dua modifo estos por la venonta numero: kovrilpaĝo pli dika.

Sed la plej grava modifo okazos komence de la jaro, kun la 13a numero, kiu havos alian titolon. Ekde la komenco, legantoj rimarkigis al ni, ke la numero de la departemento (1) en la titolo, ne taŭgas pri revuo disdonata en la tuta Francio kaj eĉ alilanden, kaj en kiu, fakte, temas tre malmulte pri la departemento Val d'Oise.

Ni elektis do la titolon "Esperanto-panorama", kiu ŝajnas al ni pli taŭga. Ĉar pluraj grafismoj estis al ni proponitaj, ni trovis nin antaŭ problemo: kiun elekti? Por helpi nin en tiu elekto, ni prezentas al vi sur la paĝo 31 kelkajn el la titoloj proponitaj, numeritaj de 1 ĝis 5. Ni esperas, ke vi bonvolos respondi al tiu malgranda enketo menciante la numeron, kiun vi preferas.

Sendu al ni, samokaze, tekstojn (francajn aŭ Esperantajn) aŭ montru al ni la temojn, kiujn vi ŝatus vidi pritraktitaj. Revuo eĉ modesta ne povas apogi sin sur la ŝultroj de solulo, des pli prave, kiam li ne plu estas juna kaj havas aliajn okupojn.

Estos sekve aliaj ŝanĝoj sed mi rezervas al vi la surprizon.

C. Cavalié

(1) 95 estas la numero de la departemento Val d'Oise.

Projets de rentrée.

oooOooo

Ce numéro sort avec un tel retard que nous voilà déjà à la rentrée. Certes la ponctualité n'a jamais été la qualité primordiale de cette modeste revue. Mais ce trimestre-ci, les différents congrès auxquels nous avons assisté, les vacances et quelques ennuis de santé ont un peu perturbé le programme initial.

Mais à quelque chose malheur est bon, et cela nous permet d'annoncer une série de changements dans la présentation de la revue, changements qui s'effectueront petit à petit. Dès ce numéro, vous constaterez que le texte français est passé à droite. En effet une de nos jeunes lectrices, approuvée en cela par tout le groupe local a suggéré que pour donner plus d'importance au texte espéranto, qui est le texte original, il fallait le placer à gauche, comme cela se fait habituellement dans les ouvrages bilingues. Nous avons souscrit à cette proposition.

La deuxième modification sera pour le numéro suivant: une couverture plus épaisse.

Mais le changement le plus important se produira au début de l'année avec le numéro 13, qui aura un autre titre. Dès le début, des lecteurs nous avaient fait remarquer que le numéro du département dans le titre n'était pas approprié à une revue distribuée dans toute la France et même à l'étranger, et dans laquelle, en fait, il n'était presque pas question du Val d'Oise.

Nous avons donc choisi le titre "Esperanto-panorama", qui nous paraît plus adéquat. Plusieurs graphismes ayant été proposés, nous nous sommes trouvé devant un petit problème: lequel choisir? C'est pour nous aider dans ce choix que nous vous présentons, en page 31 quelques-uns des titres proposés, numérotés de 1 à 5. Nous espérons que vous voudrez bien répondre à cette petite enquête en nous indiquant le Nro qui a votre préférence.

Envoyez-nous par la même occasion des textes (en français ou en espéranto) ou signalez-nous les thèmes que vous aimeriez voir traiter. Une revue même modeste ne peut s'appuyer sur les épaules d'un seul homme, à plus forte raison quand il n'est plus tout jeune et qu'il a déjà d'autres occupations.

Il y aura par la suite d'autres changements, mais je vous en ménage la surprise.

C. Cavalié

La eminentuloj de la Esperanta Movado.

Emile Boirac (1851-1917).

Tiu fama franca filozofo kaj universitatano enviciĝas, kiel generalo Sebert (1), en la Larousse du XX^{ème} Siècle (2) sed nenia aludo estas farita tie pri liaj laboroj koncerne Esperanton. Kvazaŭ li estus retkaptinta papiliojn aŭ kolektinta insignojn.

Li naskiĝis la 26an de aŭgusto 1851 en Guelma (Alĝerio). Kiel filozofo, lia ĉefa verko estas doktora tezo: "La ideo de fenomeno" (1895).

Nomumita rektoro de la Grenobla Universitato (1898), li kreis tie la elektroteknikan Instituton. Post 4 jaroj, li estis nomunita al Dijono, kie li fondis la enologian Instituton.

En 1900, li estis varbita al Esperanto per leteroj de Ch. Méray, profesoro pri matematiko en tiu lasta universitato.

Post iom da hezito, li aliĝis al la ideo kaj senlace laboris por Esperanto.

Li prezidis la unuan universalan Kongreson en Bulonjo-ĉe-maro (1905). Poste li ĉeestis ĉiujn kongresojn krom du.

Elektita de Dro Zamenhof efektiva prezidanto de la Lingva Komitato, li subtenis energie la *Fundamentajn* principojn dum la Idistaj atakoj.

Lia raporto al la 4a kongreso en Dresdo pritraktas lian partoprenon al la laboroj de la Delegacio (3) kaj ties konduton.

(1) Vidu nian lastan numeron.

(2) fama franca vortarego.

(3) Oni scias, ke la "*Delegacio por la alpreno de internacia lingvo*", kreita instigite de profesoro Louis Couturat en 1900, kunvenis unuafoje en 1907. Ĝi celis, fakte, anstataŭi Esperanton per projekto plene ŝuldata al Couturat mem, Ido. Oni scias hodiaŭ, ke de Beaufront, kiu prenis sur sin ĝian patrecon neniel partoprenis ĝian elaboradon sed, ke li defendis ĝin ĝis la morto (1935) kaj ... ke li kunportis ĝin en la tombon.

Les grandes figures du mouvement espéranto.

Emile Boirac (1851-1917).



Ce célèbre universitaire et philosophe français figure, comme le général Sebert (1), dans le Larousse du XX^e siècle, mais aucune allusion n'y est faite non plus sur ses travaux concernant l'espéranto. Un peu comme s'il s'était livré à la chasse aux papillons ou à la collection de pin's.

Il naquit le 26 août 1851 à Guelma (Algérie). "Comme philosophe, son ouvrage principal est sa thèse de doctorat: "L'idée de phénomène" (1895).

Nommé recteur de l'Université de Grenoble (1898), il y créa l'institut électrotechnique. 4 ans plus tard, il fut nommé à

Dijon où il fonda l'institut oenologique.

En 1900, il fut attiré à l'espéranto par des lettres de Ch. Méray, professeur de mathématiques dans cette dernière université.

Après quelques hésitations, il adhéra à l'idée et travailla inlassablement pour l'espéranto.

Il présida le premier Congrès Universel à Boulogne-sur-Mer (1905). Par la suite il assista à tous les congrès sauf deux.

Choisi par le docteur Zamenhof comme président effectif du Comité Linguistique, il soutint énergiquement les principes du *Fundamento* pendant les attaques des Idistes.

Son rapport au 4^{ème} Congrès à Dresde traite de sa participation aux travaux de la Délégation (2) et de la conduite de celle-ci.

(1) Voir n^o notre dernier numéro.

(2) On sait que "La Délégation pour l'adoption d'une langue internationale" créée à l'instigation du professeur Louis Couturat en 1900, se réunit pour la première fois en 1907. Elle visait, en fait, à supplanter l'espéranto par un projet dû de toutes pièces à Couturat lui-même, l'Ido. On sait aujourd'hui que de Beaufront, qui en endossa la paternité, n'y fut pour rien dans son élaboration, mais qu'il le défendit jusqu'à sa mort (1935) et ... qu'il l'emporta avec lui dans la tombe.

Lia ĉefa verko estas la *Granda Vortaro Esperanto* kun difinoj, realigita kun la senlaca helpo de majoro Fauvart-Bastoul (Fovar-Bastul) kaj de S-ino Fauvart-Bastoul (1909). Li jam publikigis tradukon de la *Monadologia* de Leibniz, en 1902 (nur du jarojn post la eklernado de la lingvo !) Li same tradukis *Don Juan*, de Molière.

Oni scias, ke dum la Bulonja Kongreso, Zamenhof proponis planon por la organizado de la Movado. Estis antaŭvidita lingva Komitato. Boirac, kiel ĵus dirite, estis la efektiva prezidanto, elektita de Zamenhof mem. La membroj de tiu komitato (102 el 28 landoj) estis tro multnombraj por efike kunlabori. Tial, en 1908, la rektoro Boirac proponis starigi en ĝia sino superan komisionon el 18 membroj. Estis la kreado de la Akademio de Esperanto, (kiu hodiaŭ nombras teorie 45 membrojn).

Emile Boirac estas la aŭtoro de la formulo tiom ofte citata : " Esperanto estos la latino de la demokratio".

Rektoro Boirac mortis en Dijono la 20an de septembro 1917, ses monatojn post D-ro Zamenhof.

" Boirac sin montris unu el niaj plej bonaj stilistoj. Per sia fluanta voĉo kaj ridetanta bonhumoro, kaj eble per sia psika influo kune kun sia persona aŭtoritato, li ĝuis grandan influon en la esperantistaj kunvenoj kaj estis ĉiam tre atente aŭskultata"

Louis Bastien

- o - o - o - o - o - o - o - o -

Diroj de iluminito

Ŝajnas, ke multaj esperantistoj eklernis Esperanton nur por havigi al si temon por diskutaĉi. Pro tio, ili daŭrigis ne multe pli ol la alfabeto.

Ceceo

- o - o - o - o - o -

Nenio tiom malkaŝas la karakteron de la homoj ol la aferoj kiujn ili mokas.

Goethe
Maksimoj kaj pripensoj

Son ouvrage principal est le Grand dictionnaire Esperanto avec définitions, réalisé avec l'aide inlassable du Commandant Fauvart-Bastoul et de Madame Fauvart-Bastoul (1909). Il avait publié une traduction de la Monadologie, de Leibniz en 1902 (Deux ans seulement après avoir entrepris l'apprentissage de la langue !). Il traduisit également Don Juan, de Molière.

On sait qu'au congrès de Boulogne-sur-mer, Zamenhof proposa un plan pour l'organisation du Mouvement. Il était prévu un Comité linguistique. Le Recteur Boirac, comme nous venons de le dire, fut le président en exercice, désigné par Zamenhof lui-même. (Les membres de ce Comité (102 de 28 pays) étaient trop nombreux pour pouvoir travailler efficacement. Aussi en 1908, le Recteur Boirac proposa de constituer en leur sein une commission supérieure de 18 membres. Ce fut la création de l'Académie d'Espéranto (qui compte aujourd'hui, théoriquement 45 membres).

Emile Boirac est l'auteur de la formule si souvent citée : "l'espéranto sera le latin de la démocratie".

Le Recteur Boirac est mort à Dijon le 20 septembre 1917, six mois après le docteur Zamenhof.

" Boirac s'est révélé comme un maître et l'un de nos meilleurs stylistes. Par sa parole coulante et sa souriante bonne humeur, et peut-être, par son influence psychique, associées à son autorité personnelle, il a joué d'une grande influence dans les réunions espérantistes où il fut toujours écouté avec attention".

Louis Bastien

- o - o - o - o - o - o - o - o -

Propos d'un illuminé

Il semble que beaucoup d'espérantistes n'ont entrepris l'étude de l'espéranto que pour avoir un sujet de controverse. C'est la raison pour laquelle ils n'ont guère été plus loin que l'alphabet.

Ceceo

- o - o - o - o - o -

Rien ne trahit autant le caractère des gens que les choses dont ils se moquent.

Goethe
Maximes et réflexions

Historiaj signiloj de la Esperanta Movado.

Antaŭ cent jaroj. 1891.

En la decembra numero de 1891, de la revuo *La Esperantisto*, Zamenhof anoncas: "Kun la nuna numero, mi devas por kelka tempo interrompi mian laboron en nia afero (...) Mi faris ĉion kion mi povis". Fakte, financaj zorgoj kaj la malsano de lia patrino (kiu forpasos la postan jaron) trudis lin ĉesigi la aperigon de la nura gazeto ekzistanta.

Unu el liaj abonantoj W.H. Trompeter, germana termezuristo, malavare proponos prizorgi la eldonkostojn, kio ebligos al la revuo postvivi ĝis 1895.

Antaŭ sepdek kvin jaroj. 1916.

Forpaso ĉe la fronto de Kapitano Auguste Capé [Ogüst Kape], naskita en 1868. En 1904, veninta el Alĝerio, kie li servis, li prezidis la Internacian Esperanto-Kunvenon" en Calais, kiu antaŭprezintis la universalajn kongresojn, kiuj estis komencontaj la postajn jarojn. Li kreis kaj direktis ilustritan revuon "*Tra la Mondo*", de 1905 ĝis 1908 kaj tradukis el François Coppée [Fransua Kopej] (kiun li varbis al la Afero) la unuan ĉapitron de ties "*Mémoires*" (Memoraĵoj).

En 1903, li petis de la ministerio pri militaj aferoj kaj ricevis de ĝi la eblon por la militistoj aliĝi al la E-Asocioj (ministeria cirkulero de la 3a de novembro 1903, konfirmita la 12an de novembro 1903 kaj la 16an de februaro 1905). Per tiu cirkulero, la E-grupoj estis rajtigitaj gvidi kursojn en la kazernoj.

Capitano Capé (kiu elektis la pseŭdonomon Montrosier) estis ano de la Lingvo Komitato ekde ĝia fondo en 1905.

- 11an de aprilo 1916. Forpaso de Théophile Rousseau [Teofil Rusoj], mortigita ĉe Verdun. Naskita en 1876, profesoro pri matematiko, li komprenis, ke Esperanto devas esti enkondukata en la ĉiutagan vivon, ke nur ĝia praktika uzado povas reteni la aliĝintojn. Jam en 1905, li klopodis por la apliko de E. al turismo; li propagandis ĉe la hotelestroj, kaj instigis eldonadon de gvidfolioj kaj gvidlibroj. Li iniciatis kun Hodler la kreadon de UEA (1908) kaj kun J. Carles, de la Jarlibro de tiu asocio (Vidu nian lastan numeron, sur paĝo 16).

Points de repère historiques du Mouvement Espéranto.

Il y a cent ans. 1891.

Dans le numéro de décembre 1891 de la revue *la Esperantisto*, Zamenhof annonce: "Avec le présent numéro je dois interrompre ma tâche pour notre cause. (...) J'ai fait tout ce que j'ai pu." En fait, des soucis d'argent et la maladie de sa mère (qui devait mourir l'année suivante), l'obligent à cesser la parution du seul journal espérantiste existant.

Un de ses abonnés W.H. Trompeter, géomètre allemand offrira généreusement de pourvoir aux frais d'édition, ce qui permettra à la revue de subsister jusqu'en 1895.

Il y a soixante-quinze ans. 1916.

Mort au front du capitaine Auguste Capé. Né en 1868. En 1904, venu d'Algérie où il était affecté, il présida la rencontre internationale d'espéranto de Calais, qui préfigurait les congrès universels qui allaient démarrer l'année suivante. Il créa et dirigea une revue illustrée "*Tra la mondo*" (*A travers le monde*) de 1905 à 1908, et traduisit de François Coppée (qu'il avait acquis à la cause de l'espéranto) le premier chapitre de ses *Mémoires*.

En 1903, il avait demandé au ministère de la Guerre et en avait obtenu la possibilité pour les militaires d'adhérer aux associations espérantistes (C.M. du 3 novembre 1903, confirmée le 12 novembre 1903 et le 16 février 1905). Par cette circulaire, les groupes espérantistes étaient autorisés à faire des cours d'espéranto dans les casernes.

Le capitaine Capé (qui avait choisi le pseudonyme de Montrosier) était membre du Comité Linguistique depuis sa constitution en 1905.

- 11 avril 1916. Mort de Théophile Rousseau, tué devant Verdun. Né en 1876, professeur de Mathématiques, il avait compris que l'espéranto devait être introduit dans la vie de chaque jour, que seule son utilisation pratique pouvait retenir les nouveaux adhérents. Dès 1905, il dirigea ses efforts vers l'application de l'espéranto dans le tourisme. Il fit sa propagande auprès des hôteliers et poussa à l'édition de prospectus touristiques et de guides. Il fut à l'origine, avec Hodler, de la création de l'U.E.A. (Association Universelle d'Espéranto (1908) et, avec J. Carles du Livre d'Adresses de consuls (aujourd'hui les délégués) (Jarlibro). (Voir notre dernier numéro, page 16).

Antaŭ kvindek jaroj. 1941.

Baltaj landoj. Plenumante sian planon pri sistema likvido de la esperantistoj, deciditan la 11an de oktobro 1939, la Sovetanoj arestas kaj ekzekutas aŭ deportas amason da esperantistoj ("satana nokto" de la 13a ĝis la 14a de junio 1941). Inter ili Henrik Seppik, la aŭtoro de la bone konata lernolibro "*La tuta Esperanto*", kiu trapasos longajn jarojn en Siberio.

La invado de la baltaj landoj fare de la Nazioj, la 22an de junio 1941 ne ĉesigos la buĉadon. Malaperis ankaŭ multaj esperantistoj. Aparte la verkistino kaj delikata poetino Helmi Dresen, kiu tiam estis urbestriko de Tallin. (U. Lins. *La danĝera lingvo*, paĝojn 397 kaj 398 kaj *Esperanto en perspektivo*, paĝon 732).

Antaŭ dudek kvin jaroj. 1966.

- La 5an de februaro 1966. Forpaso de profesoro Stefano la Colla. Naskita en 1889 en Salemi (Sicilio). Unu el la fondinto de la esperantologio, fako de la interlingvistiko, kiu pri-traktas, kompreneble, Esperanton. Esp-isto de 1906, li kreis E-grupon en Palermo. Redaktis *Itala Esperantisto*-n. Li estis membro de la Akademio de Esperanto.

- Forpaso de Henri Micard, naskita en 1897, fondinto kaj prezidanto de la Esperantista Kulturdomo (Kastelo Greziljono), en Baugé, departemento Maine-et-Loire (Nro 49). Vidu nian numeron 9, sur la paĝoj 22 kaj 23.

- la 21an de aprilo. En Limmen (Nederlando), forpaso de S-ino van Veenendaal-Bouwes, fondintino de TEJO (Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo). En 1939, ŝi kreis la revuon por junaj komencantoj "*La juna Vivo*" kiun ŝi redaktis dum longaj jaroj (Vd por pluaj detaloj Esperanto en perspektivo, paĝon 535).

- Apero de *Reĝo Lear*, laŭ Shakespeare en traduko de K. Kalocsay.

- Apero de *Ĉielarko* versa traduko de 12 fabeloj el 12 landoj, fare de J. Baghy.

- Apero de *Elektitaj paroladoj* de Ivo Lapenna, iama prezidanto de UEA.

- Universala kongreso en Budapesto. La plej impona post la Nurenberga, en 1923. Ĉirkaŭ 4000 partoprenantoj.

- **Esperanto kaj Komerc**. Eldono fare de FIAT de Esperanta ilustrita broŝuro pri la nova modelo FIAT 124.

Il y a cinquante ans. 1941.

Pays baltes. *Mettant en application leur plan d'élimination systématique des espérantistes, décidé le 11 octobre 1939, les Soviétiques arrêtent puis exécutent ou déportent une foule d'espérantistes. ("Nuit diabolique" du 13 au 14 juin 1941). Parmi eux Henrik Seppik, l'auteur de la méthode bien connue "La tuta Esperanto", qui passera de longues années en Sibérie.*

L'invasion des Etats baltes par les Nazis, le 22 juin 1941, n'interrompt pas le massacre. Au contraire ! Disparaissent encore bien d'autres espérantistes. En particulier l'écrivain et délicate poétesse Helmi Dresen, qui était alors maire de Tallin. (U. Lins. La danĝera lingvo, pages 397 et 398 et Esperanto en Perspektivo, page 732).

Il y a vingt-cinq ans. 1966.

5 février 1966. Mort du Professeur Stefano la Colla. Né en 1889 à Salemi (Sicile) L'un des fondateurs de l'espérantologie, branche de l'interlinguistique qui traite, évidemment, de l'espéranto. Espérantiste depuis 1906, il avait créé un groupe espérantiste à Palerme. Il avait été rédacteur de Itala Esperantisto. Il était membre de l'Académie d'Esperanto.

Mort de Henri Micard, Fondateur et président de la Maison culturelle espérantiste (Château de Grésillon) à Baugé, dans le Maine-et-Loire (49).

21 avril. A Limmen (Pays-Bas), Mort de Mme E. van Veenendaal-Bouwes, fondatrice de T.E.J.O. l'organisation de la Jeunesse mondiale espérantiste. En 1934 elle avait créé la revue pour jeunes débutants "La juna Vivo" (la jeune Vie) qu'elle rédigea pendant de longues années. (Voir, pour de plus amples détails : Esperanto en Perspektivo, page 535).

Parution du Roi Lear, de Shakespeare, dans une traduction de K. Kalocsay.

Parution de Ĉielarko (Arc-en-ciel) Traduction en vers de 12 contes, de 12 pays, par J. Baghy.

Parution de Elektitaj paroladoj (Discours choisis) de Ivo Lapenna, ancien président de UEA.

Congrès Universel à Budapest. Le plus imposant congrès après celui de Nuremberg en 1923. Près de 4 000 participants.

Esperanto et Commerce. Edition par Fiat d'une brochure illustrée en espéranto sur le nouveau modèle FIAT 124.

Miksajoj.

Unu el niaj abonantoj, S-ro Ben, el Calais, sendis al ni fantaziaĵon, kiun li mem tradukis el la angla.

LA VIRO KUN PLUVOMBRELO

- o - o - o - o -

Mi rakontos al vi strangan okazon, kiu trafis min kaj mian patrinon hieraŭ vespere. Mi havas dekdu jarojn kaj knabino mi estas. Mia patrino havas tridek kvar jarojn, sed mi estas jam preskaŭ tiel granda, kiel ŝi.

Hieraŭ posttagmeze, mia patrino alkondukis min al Londono por vidi dentiston. Li trovis karion. Ĝi estis en malantaŭa dento kaj li plombis ĝin, ne tro dolorigante min. Poste, mi iris al kafejo. Mi prenis bananon kun ŝaŭmkremo kaj mia patrino prenis tason da kafo. Estis ĉirkaŭ la sesa, kiam mi leviĝis por foriri.

Kiam ni eliris el la kafejo, ekpluvintis. "Ni devas preni taksion", diris mia patrino. Ni havis sur ni ordinarajn ĉapelojn kaj mantelojn, kaj tre forte pluvis.

"Kial ni ne reenirus en la kafejon kaj atendus, ke ĝi ĉesu?" mi demandis. Ni deziris ankoraŭ unu el tiu banano kun kremo. Ili estis superegaj.

"Ĝi ne ĉesos tuj", diris mia patrino. "Ni devas reiri hejmen".

Ni staris sur la trotuaro sub la pluvo, serĉante taksion. Multaj preterpasis nin, sed en ĉiuj jam estis klientoj. "Se ni havus aŭton kun ŝoforo!", ekkriis mia patrino.

Guste tiam, viro alpasis al ni. Li estis eta viro kaj li estis relative aĝa, eble sepdekjara aŭ pli. Li ĝentile levetis la ĉapelon kaj diris al mia patrino; "Pardonu. Mi tutkore esperas, ke vi pardonos min..." Li havis delikatajn blankajn lipharojn, densaj blankaj brovojn kaj faltigintaj rozan vizagon. Li ŝirmis sin sub ombrelo, kiun li tenis alte super la kapo.

"Jes?" diris mia patrino, glacitone kaj distancafekte.

"Mi demandas min, ĉu mi povus peti vin pri malgranda komplezo", li diris. Ĝi estas nur malgranda komplezo".

Mi vidis mian patrinon rigardi lin kun suspekto. Ŝi estas suspektema persono, mia patrino. Ŝi speciale malfidas du aferojn, nekonatulojn kaj duonkuiritajn ovojn. Kiam si tranĉas la supron de mole kuirita ovo, ŝi prifosas la internon per sia kulereto, kvazaŭ ŝi estus tuj trovonta muson aŭ ion tian. Koncerne

Mélanges.

Un de nos abonnés, M. Ben, de Calais, nous a adressé une amusante fantaisie qu'il a lui-même traduite de l'anglais.

L'HOMME AU PARAPLUIE

- o - o - o - o -

Je vais vous raconter une drôle d'histoire qui nous est arrivée hier soir, à ma mère et à moi. J'ai douze ans et je suis une (petite) fille. Ma mère a trente-quatre ans, mais je suis déjà presque aussi grande qu'elle.

Hier après-midi, ma mère m'a emmenée à Londres voir le dentiste. Il a trouvé une carie. C'était dans une dent du fond et il l'a plombée sans trop me faire souffrir. Ensuite, nous sommes allées au café (1). J'ai pris une banane à la crème (2) et ma mère une tasse de café. Quand nous nous sommes levées pour partir, il était à peu près six heures.

Lorsque nous sommes sorties du café il avait commencé à pleuvoir. "Il faut que nous prenions un taxi", dit ma mère. Nous portions des chapeaux et des manteaux ordinaires et il pleuvait très fort.

"Pourquoi nous ne retournerions pas au café en attendant que ça s'arrête?" demandé-je. Je voulais encore une de ces bananes à la crème. Elles étaient formidables.

"Ça ne va pas s'arrêter", dit ma mère. "Nous devons rentrer à la maison".

Nous étions sur le trottoir, sous la pluie, cherchant un taxi. Il en passait beaucoup, mais tous avaient des clients. "Ah! Si nous avions une auto avec un chauffeur!" s'écria ma mère.

Juste à ce moment-là, un homme s'est approché de nous. C'était un petit homme qui était assez vieux, peut-être soixante-dix ans ou plus. Il souleva poliment son chapeau et dit à ma mère: "Excusez-moi. J'espère de tout cœur que vous m'excuserez..." Il avait de belles moustaches blanches, d'épais sourcils blancs et un visage rose et ridé. Il s'abritait sous un parapluie, qu'il tenait haut au-dessus de sa tête.

"Oui?" dit ma mère, froidement et gardant ses distances.

"Je ne sais pas si je peux vous demander un petit service", lui dit-il. "Ce n'est qu'un tout petit service".

Je voyais ma mère le regardant avec méfiance. C'est une personne méfiante, ma mère. Elle se méfie particulièrement de deux choses: les hommes qu'elle ne connaît pas et les oeufs à la coque. Quand elle enlève la calotte d'un oeuf à la coque, elle fourrage à l'intérieur avec sa cuiller,

(1) (2) Dans le texte anglais, il est question d'un pub... et de banana split (Note de C.C.)

la nekonatulojn, ŝi havas oran regulon, kiu diras: "Ju pli afable aspektas la viron, des pli malfidema oni nepre devas fariĝi". Ĉi tiu maljunuleto estis aparte afabla. Li estis ĝentila. Li bele parolis. Li estis bonorde vestita. Li estis perfekta ĝentlemano. Tio, pro kio mi eksciis, ke li estas ĝentlemano, estis liaj ŝuoj! Oni ĉiam povas distingi ĝentlemanon laŭ la ŝuoj, kiujn li portas", tio estis ankoraŭ unu el la preferataj diraĵoj de mia patrino. Ĉi tiu viro havis belajn brunajn ŝuojn.

"Verdire," diris la vireto, "mi metis min en iom tiklan situacion. Mi bezonas helpon. Ne multan, mi certigas vin. Preskaŭ nenion, fakte, sed mi nepre bezonas ĝin. Vidu, sinjorino, maljunuloj kiel mi ofte iĝas terure forgesemaj...".

Levinte la mentonon, mia patrino rigardis lin de alte, laŭ la tuta longo de sia impona nazo. Estas io timinda, la glacia rigardo de mia patrino kun tiu senkompara nazo. La plimulto el la homoj, tute konsterniĝas kiam ŝi jetas ĝin al ili. Iun tagon, mi vidis mian propran lernejestrinon ekbalbuti kaj stulte rideti kiel simplulino, kiam mia patrino jetis al ŝi vere glacian rigardon. Sed la eta viro, starante sur la trotuaro kun sia ombrelo super la kapo, eĉ ne kuntiris la brovojn. Li faris afablan rideton kaj diris: "Mi petas vin kredi, sinjorino, ke mi ne havas la kutimon haltigi virinojn sur la stato por rakonti al ili zorgojn".

"Mi ja volas esperi tion", diris mia patrino.

Mi sentis min tre ĝenata pro la abrupteco de mia patrino. Mi volis diri al si: "Ho panjo, en la nomo de la ĉielo, li estas tre maljunega viro, li estas agrabla kaj ĝentila, kaj plie li estas ial embarasata. Ne estu tiel brutala kontraŭ li". Sed mi nenion diris.

La eta viro pasigis sian ombrelon de unu mano al la alia. "Ĝis nun, ni ankoraŭ neniam forgesis ĝin", li diris.

"Kion vi neniam forgesis?" mia patrino severe demandis.

"Mian biletujon", li respondis. "Mi verŝajne lasis ĝin en mia alia jako. Tio estas stultegaĵo, ĉu ne?"

"Ĉu vi petas min, ke mi donu al vi monon?", diris mia patrino.

"Ho neniel, dank'al Dio!", li ekkriis. "Dio min gardu, ke mi neniam faru tion!".

"Kion do vi petas?" diris mia patrino. "Nu, rapidu. Ni estos malsekigitaj ĝis la ostoj, starante ĉi tie".

"Mi ja scias", li diris. "Kaj jen kial mi proponas al vi mian ombrelon por ŝirmi vin, kaj vi konservos ĝin por ĉiam, se ... se nur ...".

"Se nur kio?" demandis mia patrino.

"Se nur vi volus doni al mi interŝanĝe pundon por pagi la taksion, ke mi iru returne

comme si elle s'attendait à y trouver une souris ou quelque chose autre. Avec les inconnus elle a une règle d'or qui dit: "plus l'homme a l'air gentil, plus on doit être méfiant". Ce petit vieux était particulièrement gentil. Il était poli. Il parlait bien. Il était bien habillé. C'était un vrai gentleman. Ce qui me faisait penser que c'était un gentleman, c'était ses souliers. "On peut toujours repérer un gentleman aux souliers qu'il porte" était encore une des formules favorites de ma mère. Cet homme-ci avait de beaux souliers marron.

"A dire vrai," fit le petit homme, c'est que je me suis mis dans une situation embarrassante. J'ai besoin d'aide. Pas grand chose, je vous assure. Presque rien, en réalité, mais j'en ai absolument besoin. Voyez-vous, madame, les personnes âgées comme moi deviennent souvent terriblement étourdies...".

Le menton de ma mère était pointé vers le haut et elle le toisait, d'un regard parallèle à son nez, qui était imposant. C'est quelque chose de terrible, le regard glacial de ma mère avec un nez pareil. La plupart des gens s'effondrent complètement quand elle leur décoche un de ces regards. J'ai vu un jour ma propre directrice d'école se mettre à bégayer et à sourire sottement comme une idiote quand ma mère lui a lancé un de ses regards de glace. Mais le petit homme, debout sur le trottoir avec son parapluie au-dessus de la tête ne sourcilla même pas. Il fit un gentil sourire et dit: "Je vous prie de croire, Madame, que je n'ai pas l'habitude d'arrêter les dames dans la rue pour leur raconter mes soucis".

"Je veux bien l'espérer" dit ma mère.

Je me sentais très gênée par la brusquerie de ma mère. Je voulais lui dire: "Oh, maman, pour l'amour du ciel, c'est un très, très vieux monsieur, et il est charmant et poli, et il a des ennuis; alors ne sois pas si brutale avec lui". Mais je n'ai rien dit.

Le petit homme passait son parapluie d'une main à l'autre. "Je ne l'avais jamais oublié, jusqu'à présent", dit-il.

"Vous n'avez jamais oublié quoi?" demanda ma mère.

"Mon portefeuille", fit-il. "J'ai dû le laisser dans mon autre veston. C'est complètement idiot, n'est-ce pas?"

"N'êtes-vous pas en train de me demander de vous donner de l'argent?" dit ma mère.

"Oh! Aucunement, grâce à Dieu", s'écria-t-il. "Dieu me préserve de jamais faire cela".

"Mais alors que voulez-vous?" dit ma mère. "dépêchez-vous donc, nous allons être trempées jusqu'aux os, à rester plantées là."

"Je sais bien", dit-il. "C'est bien pour ça que je vous propose mon parapluie pour vous abriter, et que vous conserverez définitivement, si ... si seulement..."

"Si seulement quoi?" dit ma mère.

"Si seulement vous voulez me donner en échange une livre pour mon taxi, simplement pour rentrer chez moi".

hejmen".

Mia patrino estis ankoraŭ suspektema. "Se vi ne havis monon en la unua tempo", ŝi diris, "kiel do vi ĝis tie alvenis?".

"Piedire", li respondis. "Ĉiun tagon, mi faras plaĉan longan promenadon kaj poste mi vokas taksion, kiu reveturigas min hejmen. Tion mi faras ĉiun tagon en la jaro".

"Kial vi ne piediras hejmen jam nun?", demandis mia patrino.

"Ho volonte mi tion farus", li replikis. "Ja tre volonte. Sed mi ne pensas, ke mi sukcesus per tiaj malbenitaj maljunaj kruroj. Mi jam ĝisiris tro malproksime."

Mia patrino tie staris, mordetante sian malsupran lipon. Ŝi komencis iom kormoliĝi, tion mi povis konstati. Kaj la ideo akiri ombrelon por ŝirmi sin certe tentis ŝin multe.

"Estas bela ombrelo", diris la viro.

"Jes, tion mi rimarkis", mia patrino konsentis.

"Silka ĝi estas".

"Efektive".

"Kial do vi ne prenu ĝin, sinjorino", li diris. "Ĝi kostis al mi pli ol dudek pundoj, mi certigas vin. Sed tio ne havas ian gravecon, nur ke mi povu returne iri hejmen kaj ripozigi miajn maljunajn krurojn".

Mi vidis mian patrino palpe serĉadi la fermilon de sia monujo. Ŝi ekvidis, ke mi observas ŝin. Ĉi-foje, estis mi, kiu ĵetis al ŝi unu el miaj glaciaj rigardoj kaj ŝi precize komprenis, kion mi volis diri al ŝi. "Nu, panjo", mi estis diranta al ŝi, "vi simple ne rajtas tiel ekspluati lacan maljunulon. Tio estas abomenaĵo. Mia patrino paŭzis kaj ŝi turnis al mi. Poste, ŝi diris al la eta viro: "Mi ne opinias, ke estus juste alpreni de vi silkan ombrelon de dudek pundoj. Mi opinias, ke pli bone estus, se mi nur donus al vi monon por la taksio kaj finarangus tiun aferon".

"Ne, ne, ne!" li kriis. "Ne pri tio estas la parolo! Al mi ne venus en la kapon akcepti! Neniapreze! Mi neniam akceptus monon de vi tiamaniere! Prenu la ombrelon, estimata sinjorino, kaj ŝirnu viajn ŝultrojn kontraŭ la pluvo".

Mia patrino ĵetis al mi oblikvan rigardon de triumfo. Vidu, ŝi estis diranta. Vi estas malprava. Li volas, ke mi prenu ĝin.

Ŝi serĉosis en sia monujo kaj forprenis de ĝi unupundan bileton. Ŝi antaŭtenis ĝin al la eta viro. Li prenis ĝin kaj transdonis al ŝi la ombrelon. Li enpoŝigis la pundon, levis la ĉapelon, rapide faris riverencegon kaj diris: "Dankon, sinjorino, dankon". Poste li foriris.

Roald Dahl (*The umbrella man*)
La fino en nia venonta numero

Ma mère était toujours méfiante. "Pour commencer, si vous n'avez pas d'argent", dit-elle, comment avez-vous fait pour arriver jusqu'ici?".

"Je suis venu à pied", répondit-il. "Tous les jours je fais une bonne longue promenade et puis j'appelle un taxi qui me ramène chez moi. Je fais cela chaque jour de l'année".

"Pourquoi ne retournez-vous pas chez vous à pied maintenant?" demanda ma mère.

"Oh! J'aimerais pouvoir le faire" dit-il. "J'aimerais vraiment pouvoir le faire. Mais je ne pense pas que je n'y arriverais avec ces maudites vieilles jambes. Je suis déjà venu trop loin".

Ma mère était là, qui se mordillait la lèvre inférieure. Elle commençait à s'attendrir un peu, je le voyais bien. Et l'idée d'avoir un parapluie pour s'abriter avait dû beaucoup la tenter.

"C'est un beau parapluie" dit le petit homme.

"C'est ce que j'ai remarqué", acquiesça ma mère.

"C'est de la soie".

"Je vois bien".

"Alors pourquoi ne le prenez-vous pas, Madame", demanda-t-il. "Il m'a coûté plus de vingt livres, je vous assure. Mais ça n'a pas d'importance pourvu que je puisse rentrer à la maison reposer mes vieilles jambes".

Je vis ma mère chercher à tâtons le fermoir de son porte-monnaie. Elle s'aperçut que j'étais en train de l'observer. Cette fois c'est moi qui lui lançai un de ces regards froids et elle comprit exactement ce que je lui disais. Voyons, écoute, maman, lui disais-je, tu n'as absolument pas le droit de profiter d'un vieil homme fatigué comme ça. C'est une chose abominable. Ma mère s'est arrêtée de parler et a tourné son regard vers moi. Puis elle dit au petit homme: "Je ne pense pas que ce soit très bien d'accepter un parapluie qui vaut vingt livres. Je crois que je ferais mieux de vous donner tout simplement l'argent du taxi et d'en finir avec cette histoire".

"Non, non, et non!" s'écria-t-il. "C'est hors de question! Ça ne me viendrait pas à l'idée. Jamais de la vie! Je n'accepterais jamais de l'argent de vous comme ça! Prenez le parapluie, chère Madame, et protégez vos épaules de la pluie".

Ma mère, triomphante, me jeta un regard de côté. "Tu vois", me dit-elle, "Tu te trompes. Il veut bel et bien me le donner".

Elle fouilla dans son porte-monnaie et en sortit un billet d'une livre. Elle le tendit au petit homme. Il le prit et lui passa son parapluie. Il empocha la livre, ôta son chapeau, fit à la hâte une grande courbette et dit: "Merci, Madame, merci", et puis il disparut.

Roald Dahl (*The umbrella man*)
La fin dans notre prochain numéro

Legita en la E. Gazetaro

(daŭrigo de la lasta numero)

B.- El alia grupo respondis pri la temo 58 paroj. La denaskaj lingvoj de la edzinoj estas 18 kaj de la edzoj 15. En ĉiu paro viro kaj virino estas ne ŝamlingvanoj. Kaŭze de la geedziĝo 40 virinoj ŝanĝis loĝlandon, en aliaj 14 kazoj estas la viroj, kiuj ekloĝis en la edzina lando, kaj 4 geedzoj kune translokiĝis en por ambaŭ fremdan landon.

Antaŭ la geedziĝo kaj komence de la kunvivado, 69% de la paroj komunikis inter si nur per Esperanto, aliaj 14% uzis ĝin alterne kun alia lingvo, la restantaj 17% interparolis en iu komune konata lingvo sen la helpo de la internacia lingvo.

Laŭ la kolektitaj deklaroj, 10 jarojn post la landoŝanĝo, 91% de la virinoj scipovas paroli du aŭ pli da lingvoj krom la propra denaska. En tiu unu estas normale la lingvo de la loĝata lando kaj alia Esperanto. Duono de la edzoj alproprigiĝis pli-malpli bonnivele la lingvon de la edzino. En la ĉiutaga vivo la koncernaj paroj parolas inter si plejparte en la lingvo de la lando, kie ili vivas, kaj Esperante.

Estas klare, ke la lingva prepariteco de la dua grupo ne estas pli malalta ol tiu de la unua. La B-grupanoj eĉ havas rimarkeblan pluson. Post pluaj komparoj de individuaj kazoj, mi ekhavis la impreson, ke la Esperanto-parolantaj virinoj emfazis la gravecon de la lingva diverseco ne ĉar ili renkontis pli da problemoj, sed ĉar ili prijuĝis sian situation kun pli profunda lingva kompetenteco kaj kun pli forta pretendo rilate la kvaliton de la interkomunikado.

Mi opinias, ke tiuj, kiuj alprenis la ideon de facila kaj neŭtrala solvo de la monda multlingveco, memkompreneble havas apartan mezurbazon por interkomunikaj aferoj. Se iu ekkonis la eblecon esprimi sin pli korekte kun malpli da peno helpe de Esperanto, trovas aparte ĉagrena la limigiton uzante aliajn fremdajn lingvojn, kaj ankaŭ la taksado de sia lingva preteco estas pli valora.

La interhomaj rilatoj en la nova lingva medio

Du trionoj de miaj samnacionoj plendas pro iamaj (kelkaj ankaŭ pri daŭraj) suferoj pro izoliteco, nekomprenebleco. 68% opinias, ke ties kaŭzo estas la malsama pensmaniero de la ĉirkaŭaj homoj. La statistikaj ciferoj permesas konkludi kun certeco, ke la alia grupo de intervjuitoj akceptis multe pli serene la malsamajn kutimojn kaj pensmanieron de la loĝantaro. La alkitimiĝo de la dua grupo okazis pli rapide post plurjara restado en Italio, 38% de la hungarinoj grumbas ankoraŭ pro la "itala pensmaniero", dum el la aliaj nur 13% parolas daŭre pri tia ĝeno.

Multaj respondoj rivelas, ke esperantistoj estas ĝenerale pli malfermitaj al la fremduloj. Mi citas nur kelkajn signifoplenajn pensojn ĉirilate. Iu skribinto estas germana edzino de italo; ŝi loĝis longtempe en la lando de sia edzo: "Por gejunuloj, kiuj deziras riski la aventurojn de internacia geedziĝo, ne sufiĉas la amo. Ĝi estas evidenta bazo, sed apude tuj venas la reciproka toleremo,

Lu dans la presse espéranto.

(suite du numéro précédent)

B.- De l'autre groupe, 58 couples répondirent à ce sujet. Les langues maternelles des épouses étaient au nombre de 18, et de 15 pour les maris. Dans chaque couple, l'homme et la femme étaient de langue maternelle différente. Du fait du mariage, 40 femmes changèrent de domicile. Dans 14 autres cas ce furent les maris qui élirent domicile dans le pays de leurs femmes et 4 couples s'installèrent dans un pays étranger à tous les deux.

Avant le mariage et au début de la vie commune, 69 % des couples communiquaient entre eux uniquement en espéranto, 14 % l'utilisaient alternativement avec une autre langue, les 17 % restants conversaient dans une langue qui leur était commune, sans l'aide de la langue internationale.

D'après les déclarations recueillies, 10 ans après l'émigration, 91 % des femmes savaient parler deux langues au moins, en plus de leur langue maternelle. Parmi ces langues l'une est celle du pays d'accueil et l'autre l'espéranto. La moitié des maris a maîtrisé plus ou moins bien la langue de l'épouse. Dans la vie de tous les jours, les couples en question parlent entre eux le plus souvent dans la langue du pays où ils habitent et en espéranto.

Il est clair que le bagage langagier du deuxième groupe n'est pas inférieur à celui du 1er groupe. La population du groupe B a même un avantage remarquable. D'après la comparaison de cas individuels j'ai eu l'impression que les femmes parlant l'espéranto mettaient l'accent sur l'influence de la diversité des langues, non parce qu'elles rencontraient plus de difficultés, mais parce qu'elles jugeaient leur situation avec une connaissance linguistique plus profonde et avec une plus grande sévérité en ce qui concerne la qualité de la communication.

Je pense que ceux qui ont adopté l'idée d'une solution neutre et facile à la multiplicité des langues dans le monde ont évidemment une base de mesure particulière en ce qui concerne la communication. Lorsque quelqu'un a été informé des possibilités de s'exprimer plus correctement et avec moins de peine au moyen de l'espéranto, il trouve particulièrement attristantes les limitations nées de l'usage des autres langues étrangères, et de plus, l'estimation qu'il fait de son aptitude à s'exprimer en a plus de valeur.

Les relations humaines au sein d'une nouvelle langue.

Les deux tiers de mes compatriotes se plaignent des vieilles souffrances (qui parfois durent encore) dues à l'isolement et à l'absence de communication. 68 % pensent que la cause de ces dernières est la mentalité différente de l'entourage. Les chiffres statistiques permettent de conclure avec certitude que l'autre groupe de personnes interrogées acceptaient bien plus sereinement les coutumes et les mentalités différentes des autochtones. L'accoutumance du deuxième groupe se fit plus rapidement après un séjour de plusieurs années en Italie; 38 % des Hongroises pestent encore contre "la mentalité italienne", tandis que parmi les autres, 13 % seulement signalent avec insistance cet obstacle.

De nombreuses réponses révèlent que les espérantistes sont généralement plus ouverts aux étrangers. Je ne cite que quelques réflexions significatives à ce sujet. L'une des correspondantes est l'épouse allemande d'un italien. Elle a vécu longtemps dans le pays de son mari: "Pour des jeunes qui désirent risquer l'aventure d'un mariage international, l'amour ne suffit pas. Il est la base évidente, mais à côté, vient aussitôt la tolérance réciproque, dans un très grand respect de l'autre culture... Ce partenaire qui accepte de vivre dans le pays de l'autre

en grandega respekto de la alia kulturo ... Tiu partnero, kiu akceptas vivi en la lando de la alia, nepre devas klopodi sincere eniri la socion kun ĉiuj konsekvencoj ... kaj ne esti ŝlosita kaj izolita en sia sinteno".

Restas la demandoj, ĉu al Esperanto alproksimiĝas plejparte nature malfermitaj personoj kun antaŭa inklino al fratecaj rilatoj, aŭ ĉu la homoj akiras tiun emon danke al la uzo de la internacia lingvo kaj al humanisma idealo de ĝia aŭtoro? La respondo ne multe gravas. Gravas la malkovro, ke Esperanto kaj toleremo tre ofte intime rilatas.

Ĉar mia kazo tute ne estas unika, mi devas aldoni, ke danke al Esperanto eĉ ne dum unu tago mi sentis min izolita en la lando de mia edzo.

Esperanto kaj la loĝlanda lingvo

Post la ŝanĝo de la loĝlando la plej urĝa tasko estis por ĉiuj translokiĝintoj la kiel eble plej bona alproprigo de la loka lingvo. La iomgrada kono de la rusa, germana aŭ de la angla, ne multe helpis tiu- ĉe al la hungarinoj en Italio. Kaj kio pri Esperanto? ... Nu, ĝi puŝis kaj bremsis la progreson samtempe.

